



INTERNACIA FERVOJISTO

2016.1



La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn

NI ESTU REALISTOJ !

En la numero 6/2015 IF aperis artikolo kun la titolo „Pesimismo aŭ optimismo?”. Mi proponis daŭrigi tiun polemikon, kaj mi atendis viajn opiniojn. Bedaŭrinde nur unu opinio alvenis el Ĉinio, fare de Han Zuwu. Laŭ tio, por solvi la ekzistantajn problemojn de IFEF, li proponas kaj necesas:

- havigi saĝajn, seriozajn, aktivajn, kapablajn kaj sindonemajn estrojn de la landaj asocioj;
- montri al la fervojistoj la utilecon de Esperanto en la aplikado kaj la internacia interŝanĝo pri la progresema fervojaj sciencteknikoj kaj sukcesaj atingoj de la fervojkonstruado, por ke la fervojistoj ekkonu la aktivecon de la landaj asocioj kaj IFEF;
- finance helpi la landajn asociojn por organizi en- kaj eksterlandajn Esperanto-aktivadojn, ĉefe monsubteni fervojistajn gejunulojn, por ke ili povu partopreni en la IFEF-kongresoj, kaj aliaj aktivecoj, pro tio IFEF havu sian fonduson por tiuj celoj;
- kombini la Esperanto-movadon kun la ŝtatpolitiko por montri la utilecon kaj funkcion de la fervojista E-movado, eĉ devus apliki Esperanton ankaŭ en diversaj sferoj, kiel la turismo, komerco, kulturo, arto, pedagogio, scienctekniko ktp;
- Kulturi kaj eduki junajn fervojistajn esperantistojn, kiuj daŭrigas nian agadon, ĉar tiu tasko estas la plej grava strategia ideo.

Fine li proponas, ke ni plibonigu la propagandan laboron, ni klopodu labori persiste kaj sindoneme, ni helpu la agadon de la nuna kaj la estonta IFEF, eĉ la tutan fervojistan Esperanto-movadon.

Fine li akcentas: Ni estu realistoj!

István Gulyás

FRONTPAĜO: Grandrapida trajno sur la magnetrelvojo en Ŝanghai (Ĉinio)

ENHAVO:

Ni estu realistoj!	2	Kongrespropono de la estraro	8
Zamenhof-festo en Parizo	3	La 23-a IES	10
Magnetrelvojo en Ŝanghai	4	La trajno perdas	13
Norreport stacio (Kopenhago)	5	Honorigitoj	16
Tagordoj de la 68-a IFK	6	La 88-a SAT-kongreso	17

Zamenhof-festo 2015 en Parizo

La 15-an de decembro 1859 en Bjalistok naskiĝis *Ludoviko Lazaro Zamenhof* la unua filo de *Markus Zamenhof* kaj de *Rozalja Sofer*. Kvar aliaj filoj kaj tri filinoj poste venis. La 21-an de majo 1887 *Lazaro* la iniciinto de nia internacia lingvo verkis la unuan libron de lingvo internacia sub la kaŝnomo *D-ro Esperanto*.

Okaze de lia naskiĝdatreveno, de longa tempo, ĉiujare la esperantistoj festas por honori tiun genion. Organizita de la Fervojistoj kaj de Esperanto-France, la Zamenhof-festo okazis en Parizo sabaton la 12-an de decembro 2015 en la salono pruntedonita de la sociala libertempa fervoja organizo (UAICF). Proksimume cento da ĉeestantoj eniris la salonon. Ĉe la enirejo de la salono pluraj helpantoj proponis al la alvenantoj programon de la manifestacio kaj loteribiletojn ĉiujn gajnantajn se ni fidas al la parolo de la vendantoj. Fakte oni konstatis ke tiu aserto fariĝis realo okaze de la malfermo de la koverta. Ankaŭ ni ricevis bileton por senpage eniri la parizan muzeon de la lingvoj kaj de la lingvistiko. Hubert Peyrouy anoncis la unuan parton de la festo. Temis pri akordiono-orkestro konsistanta el kvar akordionistoj superigitaj de la orkestro-ĉefo elektronik-pianludanta. La programado montris riĉan kaj esoterikan koncerton. Multajn melodiojn konis la partoprenantoj, kiuj kune reprenis la rekantaĵojn, dum kelkaj aliaj skizis kelkajn dancopaŝojn. Aplauĉoj bruas en la salono por danki kaj laŭdi la muzikistojn.

Post eta paŭzo, dum kiam la loteriaĉetantoj ricevis siajn promesitajn lotaĵojn, spektaklo denove ekdaŭris. Hubert denove alvokis la ĉeestantojn al sidanta pozicio. Li prezentis ĉe la esperantistoj nekutiman spektaklon nomatan "RAP". Tiu perbuŝa dirmaniero devenas de la muziko "hip-hop" aperinta meze de la jaroj 1970 en la usonaj gentoj. Unuavide "Rap" proksimiĝas al la afrika kulturo. Interpretis tiujn kantojn Platano juna rapa esperanto-parolanto, membro de la grupo "La Pafklik" (franclingve La gachette) kiu proponis, antaŭ ĉiuj, albumon de hip-hop en esperanta versio. Sekvis alia artisto nomata "Zhou Mack" deveninta el Afriko kaj ankaŭ esperanta parolanto. Li kantis, gitarludis kaj perkutludis.

Ni trapasis agrablan posttagmezon kaj kompreneble ni ne devas forgesi niajn kutimajn helpantojn sen kiuj ne eblus prepari tiun amikan renkonton.

Jean Ripoché

Magnetrelvojo en Ŝanghai

Mallonge antaŭ jarfino 2000 *Siemens* kaj *Thyssen-Krupp* subskribis kontrakton kun la urbo *Ŝanghai* pri konstruo de magnetrelvojo de la sama tipo, kiun ili konstruis en Germanio, Transrapid. Jam 22 monatojn (kaj pli ol unu miliardon da EUR) pli poste estis preta la itinero de la suda rando de *Ŝanghai*-a urbocentro al la internacia flughaveno



A. Meinel apud la grandrapida trajno dum la 58-a IFK en Ŝanghai

Pudong Airport. La 30 km oni veturas dum nur ok minutoj.

Kvankam estis grandaj planoj plilongigi la itineron kaj vastigi la tutan projekton, unue ĝis *Hangzhou*, kiu situas 175 km for de *Ŝanghai*, kaj poste al Pekino 1200 km for, per tiuj 30 km al la flughaveno finiĝis la projekto. Ĝis 2007 la germanaj firmaoj havis esperon daŭrigi la projekton, ĝis fine la urbo *Ŝanghai* ĉesigis la aferon. Laŭdire la plej gravajn protestojn faris la 'najbaroj', t.e. la homoj kaj loĝantoj, kiuj devus havi la magnetrelvojon 'malantaŭ la domon'. La magnetrelvojon oni en Ĉinio konstruas sur unua etaĝo en la pejzaĝo, kaj ne ĉiuj opinias, ke tio belas.

La magnetrelvojo neniam fariĝis transportrimedo por la ĉinoj. Ĝi

estas konstruiita ne por transporti homojn, sed por impresi homojn – *high-tech*-turistatrakcio. La plej multaj pasaĝeroj estas turistoj, kaj la plej multaj ĉinoj, kiuj iras al la flughaveno, veturas per aŭto aŭ aŭtobuso.

Anstataŭ magnetrelvojon la ĉinaj aŭtoritatoj elektis evoluon de grandrapidaj trajnoj, kaj nun veturas trajnoj de *Ŝanghai* al *Hangzhou* dum 52 minutoj kun rapideco ĝis 300 km/h. Oni ankaŭ per grandrapidaj trajnoj veturas ĝis Pekino. Ankaŭ pri la konstruo de grandrapidaj trajnoj la ĉinoj plej ofte elektas meti la trakaron 'en la unua etaĝo'.

En Svedio oni nun volas enkonduki grandrapidajn trajnojn, unue de *Stockholm al Malmö*, - la trajnoj veturu ĝis 320 km/h, kaj la daŭro de la veturo estos 2½ horoj anstataŭ nun 6 horoj. La projekto estas vere en skiza formo, nur somere 2016 oni findecidos pri la tuto, sed laŭdire ĉina entrepreno faris jam oferton pri la konstruo laŭ triona prezo kompare kun aliaj ofertoj. Oni pripensu tamen la konstrumanieron, kiu estas la 'ĉina'. Eŭropo verŝajne devas decidi, kion oni deziras tiurilate, ĉar sendube rilate al komforto kaj vojaĝtempo la ĉinoj povas forkonkurenci la eŭropajn grandrapidajn trajnsistemojn.



La indikilo montras la rapidecon 431 km/h

Jan Niemann

Nørreport Stacio en Kopenhago



Finfine, post jaroj da laboro en- kaj eksterdome la nova stacio Nørreport en la centro de Kopenhago estas preta. Nu ... mankas io pri la ŝtuparo, kaj pro tio momente estas komplika afero iri de la region-trajna kajo al la metroat (kaj la metroo veturas rekte kaj tre rapide al la kopenhaga flughaveno

kaj estas tre uzata).

Sed la EKSTERO estas preta. Por vi, kiuj

- ĉeestis la fakan prelegeton de DEFA dum la 66-a IFEF-kongreso en SBT 2014
- spertis/spektis la ĥaoson ĉe Nørreport dum la UK en Kopenhago 2011
- vizitis Kopenhagon dum la lastpasintaj jaroj ... ni jen prezentas la finan, belan rezulton.

DEFA

TAGORDO DE LA PUBLIKA KOMITATKUNSIDO
en la 68-a IFEF-kongreso en Varna (BG) 24.05.2016

- 1. Malfermo, konstato de la mandatoj**
- 2. Ricevitaj telegramoj, leteroj**
- 3. Honorigo de la mortintoj**
- 4. Estraranaj raporto**
 - 4.1. Sekretario
 - 4.2. Redaktoro
 - 4.3. Kasisto
- 5. Protokoloj IFK 2015 Kunming (CN)**
- 6. Raporto de la ĉefkomitatano**
- 7. Kongresproponoj**
 - 7.1. Estrarelekto
 - 7.2. Statut-ŝanĝoj rilate al la elekto de la Ĉk
- 8. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)**
 - 8.1. Gvidanto
 - 8.2. Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)
 - 8.3. Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)
- 9. Raportoj de la komisiitoj**
 - 9.1. Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA.
- 10. Resumo de la jarraportoj 2015 el la landaj asocioj**
- 11. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF**
- 12. Buĝeto 2016, kaj kotizkonfirmo**
- 13. Rilatoj al aliaj organizoj:**
 - 13.1. UEA
 - 13.2. FISAIC
 - 13.3. SAT- ILEI - UMEA - ISAE
- 14. Venontaj kongresoj**
 - 14.1. Konfirmo de la invito al la 69-a IFK en 2017
 - 14.2. Elekto de la lando por la 70-a IFK en 2018
 - 14.3. Diskuto pri pliaj eblecoj
- 15. Raportoj de la laborgrupoj**
- 16. Eventualaĵoj**
- 17. Libera diskutado**

Vito Tornillo
Sekretario de IFEF

TAGORDO DE LA NEPUBLIKA KOMITATKUNSIDO en la 68-a IFEF-kongreso en Varna (BG) 23.05.2016

- 1. Malfermo, konstato de la mandatoj**
- 2. Diskutoj pri kongresproponoj**
 - 2.1. Estrarelekto.
 - 2.2. Statut-ŝanĝoj rilate al la elekto de la Ĉk.
- 3. Honorigoj**
- 4. Diskuto kasraporto-bilanco 2015/buĝeto 2017**
- 5. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF**
- 6. Diskuto pri venontaj kongresoj**
- 7. Analizo pri eksteraj rilatoj**
- 8. Eventualaĵoj**

Vito Tornillo
Sekretario de IFEF

TAGORDO POR LA KUNVENO DE FK DUM LA 68-a IFEF-KONGRESO

- 1. Bonvenigo kaj enkonduko fare de la FK – gvidanto.**
- 2. Raporto de la Faka Aplika Sekcio – sekretario.**
- 3. Raportoj pri faka laboro en unuopaj IFEF landaj asocioj.**
- 4. Fakaj programeroj dum la 68-a IFK.**
- 5. Raporto de la Terminara Sekcio – sekretario.**
- 6. Raportoj de la TS-kunlaborantoj (kaj landaj kaj individuaj).**
- 7. Trakto de nocioj laŭ informoj en Terminaraj Kurieroj.**
- 8. Fakaj programoj dum la 69-a IFK.**
- 9. Novaj taskoj por la sekcioj.**
- 10. Eventualaĵoj (sub tio korektado de la adreslisto).**

Jan U. Niemann
Gvidanto de FK

Kongrespropono de la estraro por la 68-a IFK

Dum la legado de la statuto (dum la estrarkunsido) venis diskuto pri estonta ebleco elekti la Ĉk-n.

Komentario:

Se la Ĉk kaj ties anstataŭanto estas ili mem la solaj komitatanoj de iu lando dum tri-jara periodo, tio signifas ke el la koncernaj landoj oni ne povos nomumi samlandanojn je la fino de tiu oficperiodo, sed nur post tri jaroj, kondiĉe ke ili iĝos tuj komitatanoj.

Ni ne havas grandan disponon de personoj, pro tio ni devas kapti la okazon kiam ĝi venas.

Laŭ la nuna statuto:

§ 12 La komitato estas la decida organo de IFEF.

§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato.

1) Ĝi konsistas el komitatanoj, delegitaj de propraj landaj asocioj por ilin reprezenti.

2) Se necesas reprezenti apartan komisionon aŭ laborgrupon, la komitato povas alekti kromkomitanon.

3) La komitatanoj elektas inter si la ĉefkomitanon kaj ties anstataŭanton

§ 14 Anstataŭado de komitatano

1) Landa asocio, landa sekcio aŭ komisiono rajtas skribi delegi por difinita komitatkunsido samrajtan anstataŭanton por komitatano aŭ kromkomitatano malhelpata partopreni en tiu kunsido.

Povus esti:

§ 12 La komitato estas la decida organo de IFEF.

§ 13 Konsisto kaj elektoj de la komitato.

- 1) Ĝi konsistas el komitatanoj **kaj ties anstataŭantoj (aŭskultantoj)**, delegitaj de propraj landaj asocioj por ilin reprezenti.
- 2) Se necesas reprezenti apartan komisionon aŭ laborgrupon, la komitato povas alekti kromkomitatano.
- 3) La komitatanoj elektas inter si la ĉefkomitatano kaj ties anstataŭanton

§ 14 Anstataŭado de komitatano

- 1) Landa asocio, landa sekcio aŭ komisiono rajtas skribi delegi por difinita komitatkunsido samrajtan anstataŭanton por komitatano aŭ kromkomitatano malhelpata partopreni en tiu kunsido.

Laŭ la nuna regularo:

Ĝenerala Regularo § 13, Konsisto kaj elektoj de la komitato § 13 Al 1) kaj 2)

- a) Komitatanoj kaj kromkomitatanoj devas esti aktivaj, emeritaj aŭ estintaj fervojistoj aŭ personoj el asimilitaj entreprenoj. Ili devas esti IFEF-membroj kaj devas skribi deklari pretecon konservi la oficon dum la trijara laborperiodo.

Povus esti:

Ĝenerala Regularo § 13, Konsisto kaj elektoj de la komitato § 13 Al 1) kaj 2)

- a) Komitatanoj, **ties anstataŭantoj** kaj kromkomitatanoj devas esti aktivaj, emeritaj aŭ estintaj fervojistoj aŭ personoj el asimilitaj entreprenoj. Ili devas esti IFEF-membroj kaj devas skribi deklari pretecon konservi la oficon dum la trijara laborperiodo.

Certe se la komitato unuanime decidas elekti personon kiu ne estas en ĉi tiu kondiĉoj, la decido estas same valida.

La 23-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO ROSES 3-11.10 2015

La aranĝo okazas ĉiujare aŭtune en Katalunio. Ĉi-foje ni ĝuis ĝin en la ĉemara urbo Roses (hispane Rosas), kiu situas tute proksime al la franca landlimo. La urbo estas grava turisma kaj kultura centro kun hoteloj, plaĝoj kaj du havenoj. Unu utilas por la fiŝkaptado kaj alia por la plezuro, kie en kanaloj navigas privataj ŝipoj. En Roses troviĝas ankaŭ pluraj antikvaj konstruaĵoj, inter kiuj estas unika historia citadelo.



Dum la inaŭguro Rodica Todor salutas nome de IFEF

La eventon partoprenis 98 esperantistoj el 13 landoj. Ni loĝis en komforta tristela hotelo “Sant Marco”, kie ni bone manĝis kaj ĉiuvespere eblis danci ĝis la noktomezo. Por niaj ĉiutagaj aktivaĵoj ni havis je dispono grandan salonon. En la inaŭguro ni

havis la plezuron bonvenigi la urbestrinon de Roses, s-ino Montse Mindam. Ŝi adresis al ni agrablajn vortojn kaj bondeziris sukcesan E-Semajnon. Ŝi ankaŭ menciis, ke en la fora pasinteco en la urbo jam ekzistis esperantista grupo.

Dum la semajno okazis pluraj interesaj prelegoj, debatoj kaj diskutoj. Kun Dalia Pileckiene el Litovio ni lernis kiel mastrumi nian tempon. Alian tagon ni alfrontis iom komplikan temon, kiun ni devis solvi el psikologia vidpunkto. Gesinjoroj Perla Martinelli kaj Giorgio Silfer el Svislando prezentis la libron “Historio de la esperanta literaturo”. Giorgio verkis ĝin komune kun Carlo Minnaja. Interesatoj povis aĉeti ĝin surloke. Alia ilia prelego temis pri ENA (Esperanto Natur-Amikaro). Ni akiris informojn pri ilia laboro kaj pri la estontaj planoj. Marcel Delforge el Belgio parolis pri la historio de Neutrala Moresnet, kie estis fondita kaj iom da tempo ekzistis Esperanto-Amikejo Gesinjoroj Buŝs el Latvio prezentis verkojn

de la latva poeto Imants Ziedonis. Prelego de Luis Serrano temis “Ĉu malaperos nia planedo Tero?” Tio estas pripensenda temo...

Vespere ni ĝuis du interkoniĝojn kun vino kaj dolĉaĵoj. Bonan etoson kreis la folkloro grupo “Montjuic”, kiu ĝojigis nin per belaj kantoj “Habaneras”. Ne mankis nia ŝatata “cremat” - bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj. Unu vespero estis dediĉita al opero. Laŭ propono de Maria Ferigle ni spektis sur ekrano operon de la itala komponisto Giacomo Puccini “Madame Butterfly”.



Partoprenantoj de la IES



Gejunuloj "laboras"

sendis dankleteron al s-ro Luis Serrano.

Kiel jam konate Rodica Todor el Rumanio ĉiam proponas interesan instruprogramon. Ĉi-foje ni debatis pri strategioj de komunikado en homaj interrilatoj. Ni laboris en grupoj kaj alfrontis diversajn temojn. Ekzemple, konfliktoj inter generacioj, diversaj grupoj, asocioj ktp. Aktuala situacio pri enmigrintoj ankaŭ estis traktita. La temoj estis tre

La premio “Ada Sikorska” estis atribuita al la pola blinda poetino kaj prozverkistino Halin Kuropatnicka-Salamon pro ŝia meritplena poresperanta laboro. La prestiĝan premion oni jam pli frue sendis al ŝi okaze de festa renkontiĝo. S-ino Halina

estis tre kortuŝita kaj

vastaj kaj ni vigle diskutis, donis niajn opiniojn, analizis kaj provis trovi pozitivaĵojn en diversaj situacioj. Aparte ŝi organizis paroligan kurson por komencantoj.



Vizito de muzeo Salvador Dali en Figueres

Okazis ankaŭ ekskursoj. Dum la duontaga ekskurso ni vizitis urbeton L'Escala, kie ni en fabrikejo vidis prilaboradon de anĉovoj. Poste ni gustumis ilin. Kompreneble, ne mankis aĉeteblo. En la urbo Roses ni vizitis lokan muzeon kaj citadelon de la 17-a jarcento kun grekaj kaj romiaj restaĵoj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la proksima urbo Figueres. Unue ni vizitis la kastelon Ferran kaj poste la faman muzeon de Dali. Posttagmeze ni daŭrigis nian busvojaĝon ĝis la urbeto Banyoles. Tie ni restis dum kelkaj horoj ĉe la lago. Eblis ŝippromeni sur ĝi aŭ uzi turisman trajneton por traveturado de la urbo. Iuj tutsimple piedpromenis laŭ la bordo de la lago. Post agrabla kafumado kaj biertrinkado ni revenis kontentaj al Roses.

Lastan vesperon Luis Serrano lanĉis debaton pri funkciado de la Semajno. Partoprenantoj estis plejparte kontentaj. Nur la alveno al Roses estis ĉi-foje iom pli komplika ol kutime pro neekzisto de trajno ĝis tie. Ni promesis veni denove venontjare. Tiam Luis, la ĉeforganizanto festos sian 90-jariĝon. Do, ni deziras al li kuraĝon kaj sukceson!!!



La folkloro grupo "Montjuic"

La trajno perdas tion kion ĝi havis kiel neatenditaĵo, renkontoj kaj poezio.

Jen raporto de la ekologia revuo « Reporterre » intervjuanta Benoît Duteurtre.

Benoît Duteurtre estas romanverkisto, eseisto kaj muzikista recenzisto. Lia laste aperinta libro « La nostalgie de la restoracio stacidoma » aperis ĉe la eldonistaro Payot kaj Rivages.

Benoît Duteurtre estas amanto de la trajnoj sed amanto forĵetita : malapero de fervojaj linioj, fino de la laŭkilometra tarifado, sidrezervad-sistemo kaj de kontrolo pli kaj pli rafinitaj, stacidomoj forigitaj de la urbocentro aŭ ŝanĝigataj en komercajn galeriojn... Poezio de la vojaĝo malaperas. Sed la fervoja sistemo estas spegulo de la nuntempa ŝanĝo.

Reporterre

SNCF nomiĝas « Societo nacia de la fervojo » sed ĉu ankoraŭ eblas konsideri la fervojan sistemon kiel publikan servon ?

Benoît Duteurtre

Tion mi nomas ĝin « skizofrenio » tiu duobla ludo kie, unuflanke oni faras gravajn diskutojn pri publikaj servoj sed aliflanke realo instigas nin al konstanta privatigo. En Francio, kiu historie prezentas evidentan centralizismon kaj iamaniere fidelecon al ŝtataj tradicioj, neniam iris al vojo de ekonomio libera. Neniu dekstra aŭ maldekstra ŝtatpotenco diris, ke ili rezignis la publikan servon, eĉ se li faris konkrete. Tio estas ekzakte kio okazas por la trajnoj en Francio ; neniu kontraŭas ekzistadon de la SNCF kiel granda ŝtata entrepreno kaj efektive ĉiuj reformoj interne estritaj celas konformiĝi ĝin al modelo de privata entrepreno.

Vi certigas ke la fervoja servo sekvas la aeran modelon. Kiamaniere ?

La aera sistemo eniris multe pli rapide ol la fervojo en tiu entreprena logiko, de marko kaj de konkurenco. Fakte, tio estas ligita al geografiaj devigoj : movigi trajnojn postulas fervojan reton, necesigantan iamaniere publikan administradon, kiun oni ne bezonas tiom da ĉe la aera sistemo.

Alia ekzemplo estas la disvolviĝo de ofertoj *low-cost* (malalta prezo), kiel Ouigo. Evoluigi la trajnojn al markoj kontribuas al malstrukturi ideon de kompleta servo kaj konsekvence de publika servo. Restas nur grupo da entreprenoj en kiu ĉiu trajno iĝas entrepreno.

Vi insistas sur la nocio de « centro-surmerkatado » de la stacidomoj, kiuj, pli kaj pli, similas al fluĝhavenoj. Tio kontestas tiujn lokojn kiel publikajn spacojn. Tiel oni ne akceptis ke nia fotografisto fotis en la stacidomo Saint-Lazare sen ricevi antaŭan permesilon.

En la atendejo, ŝanĝi la atend-tempon en aĉetad-tempon, tio estas la principo mem de la modernigo de la stacio Saint-Lazare. Raporti pri la metamorfozo de la mondo en komercan galerion estas speco de obsedo ĉe mi. Tiu transformiĝo de la spaco estas rekte perceptebla en Saint-Lazare : oni perdis ĉion kiel neatenditaĵon, renkontojn, kaj poeziaĵon en tiuj lokoj. Tio kio instigas min titoli mian libron : la malapero de la stacidomaj restoracioj kaj de verŝtabloj, kaj de kelneroj, anstataŭitaj de memservaj restoracioj kie la kliento faras si mem la tutan servon, de la elekto de la aĉetaĵoj ĝis la atendovico por pagi ĉe la kaso.

Tio enigas profundan transformadon de la ideo de « servo » : konsumanto origine kliento devigas al si mem prizorgi sian propran servon. Li estas devigata fari ĉion : printi hejme sian trajnbileton, moviĝi al la restoracivagono, ktp. Tiel, la servo iĝante komerca entrepreno, ĉiam celas al plia redukto de sia personaro kaj al trudi la klientojn por prizorgi ĉiujn taskojn. Tio ne validas nur por la trajnoj sed iĝas fascinanta inklinado de niaj societoj.

La halo stacidoma (halo de la perditaj paŝoj) iĝus la halo de la paŝoj rentabilitataj : ĉu la disvolviĝo de la trajno je granda rapido (TGV) kaj ĝia idealo de rapideco favorigis tiun tendencon ?

La grandrapida trafikoferto kontribuas al tiu maksimuma rentabilitato de la tempo kaj al tiu kreskado de la produktiveco de ĉiu opulo – oni organizas kunvenojn en Liono aŭ en Marsejlo en la sama tago sed vespere oni reiras Parizon por ke oni estu efika ekde la morgaŭa mateno. Tio generas diferencojn inter la mondo de la rapido kaj la mondo de la malrapido, la mondo de la rentabilitato kaj la mondo de la publika servo.

Mi ne neas la praktikan flankon nek la fascinadon kiu povas esti enigita de la teknika sukceso de trajnoj je granda rapido. Sed la trajno ne estas utila nur por moviĝi la plej rapide eble de iu urbo al alia. Ĝi estas grava nodo de komunikado sur nia teritorio.

Kion opinii pri la projektoj de novaj linioj je granda rapido elvokitaj de la registaro ?

Mi ne kontraŭas la disvolviĝon de la granda rapido en si, kondiĉe ke ĝi estu plia aldono al la tuta fervoja sistemo. Necesas ke la linio je Granda rapido estu kunligita al la duaranga fervojreto kaj ne fari apartan reton. Nu, estas precize kio okazas nun ! La novaj stacioj sur tiuj linioj ne plu konektas la historian reton : kiam vi malsupreniras la trajnon en Aix-TGV, estas necese eniri buson aŭ alian veturilon...

Tiel, konsekvence, oni kreas tute alian sistemon de fervojo bazitan sur aliaj ekonomiaj konceptadoj anstataŭ la malnovan reton kiun oni neglektas ĝis ĝia morto. Sekve aŭtobusoj postvenos. Mi tute ne konsentos kun tiu projekto. Estas necese unuatempe perfertigi la ekzistantan reton, kaj plie aldoni, kial ne, liniojn por granda rapido.

Konsiderante ke finfine oni perdas la ekologiajn profitojn de la trajn-uzado...

Trajno estas la plej bona transportrimedo... kondiĉe ke li ĉepasu la tutan teritorion ! Ne se ĝi devigas aŭtomobilojn pli kaj pli necesajn pro la maldensigitaj stacioj pli kaj pli situataj for de la urboj.

Ke la ministro Macron sukcesis lanĉi sian leĝon koncerne aŭtobusojn dum kiam la prezidento Hollande preparis la COP 21 (21 priklumata konferenco en Parizo en 2015) sin prezentite kiel la ĉefa protektanto de la aero-kvalito kaj de la lukto kontraŭ la klimata revarmigo – tio estas mirkonsterna. Politiko iĝas komunado-parolado kiu ne plu rilatas kun la reala agado de la ŝtatpotenco.

Paradokse, referante vian libron, indus kredi ke ne plu estas aliaj solvoj krom la leĝo Macron, precize...

Memdecide oni lasas putri iujn ajn nombrojn da servoj por ke, finfine, la publiko preskaŭ ĝojas pri ilia malapero. Tio estas tekniko banale disvastigita.

Sed, por mi, nenio egalas la trajnon, ne eblas anstataŭ ĝin per aŭtobusoj. Trajno konsistas el partikulara transport-sistemo, aparta rilate ĝian komforton, ĝian akuratecon, la liberecon kiun ĝi permesas al la uzantoj sin ripozi, studi, babiladi, nutri sin, paŝi por senridigi siajn gambojn.

Ĝi reprezentas altnivelan civilizacion, kiun oni deziras nun rigardi kiel aĵon arkaisman, eksmodan, kiun oni deziris anstataŭigi per nova modelo. Kontraŭe mi opinias ke la « olda » modelo de la trajno kunliganta la tutan teritorion konstituas grandan sukceson de la moderneco ekde kiam oni konsideras la modernecon kiel gajno en la kvalito de la vivo.

HONORIGITOJ

Laŭ la preskribo de la Ĝenerala Regularo de IFEF, ni publikigas la liston pri la **vivantaj** honoraj prezidantoj kaj membroj de IFEF, pri honoraj membroj de FISAIC, pri honorigitoj per speciala FISAIC-medalo kaj pri Honora Patrona Komitato de IFEF.

Honoraj Prezidantoj de IFEF

Dr Bolognesi, Romano	Italio	2009
----------------------	--------	------

Honoraj Membroj de IFEF

Kruse, Elfriede	Germanio	1980
De Sutter, Lucien	Belgio	1997
Li Sen	Ĉinio	2006
Nobuki, Naosuke	Japanio	2006
Robiollé, Pierre	Francio	2007
Stuppnig, Martin	Aŭstrio	2008
Inĝ Gulyás, István	Hungario	2009
Dr Hoffmann, Heinz	Germanio	2010
Brletić, Marica	Kroatio	2010
Ripoche, Jean	Francio	2010

Honoraj Membroj de FISAIC

De Sutter, Lucien	Belgio	1998
Ph Dr Abelovská, Anna	Ĉeĥio	2007

Honorigitoj per speciala FISAIC-medalo

Geroldinger, Johann	Aŭstrio	1967
Kruse, Elfriede	Germanio	1975
Robiollé, Pierre	Francio	1994
Huber, Walter	Aŭstrio	2010
Tomíšek, Jindřich	Ĉeĥio	2012

Honora Patrona Komitato de IFEF

Ceci, Pasquale	Italio	1970
Dr Boulton, Marjorie	Britio	1977
Inĝ Rodak, Aleksander	Pollando	1987
Vojtech, Zelenka	Ĉeĥio	2003
Ph Dr .Abelovská, Anna	Ĉeĥio	2011

LA 88-a SAT-KONGRESO (8-15.08.2015)

La kongreso okazis en la slovaka urbo Nitra, situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava. La eventon partoprenis pli ol 50 esperantistoj el 18 landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madagaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.



Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláz. La kongresejo troviĝis en la universitata studenthejmo „Anton Bernolak”. En la akceptejo estis instalitaj tri libroservoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis esperantaĵoj por vendado. En apuda ĉambro ni admiris ekspozicion de diversspecaj bildoj. Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh, kaj Peter Baláz prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn. La organizanto prezentis skize la programon de la tuta kongressemajno. Dum la kongreso okazis

laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato. Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri programo kaj planoj de E@I. Stano Marček prelegis pri fungoj, kaj informis pri siaj lernolibroj „Esperanto per rekta metodo”.

Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentita de Johan Derks. Kun Peter Baláz oni diskutis pri la temo „Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj?”. Estis ellaborita kaj akceptita la Gvid-rezolucio, en kiu oni



Hideko Huĝimoto prezentis teo-ceremonion

krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro.

Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo. Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo. Poste ni vizitis la sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo. Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn. Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teo-ceremonio laŭ japana maniero. La dua duontaga ekskurso kondukis nin al la urbo Topolčianky, kie ni vizitis ĉevalojn. Tie oni bredas plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbole donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio en 2008. La reĝino kontribuas al ties zorgado, kaj oni povas rimarki, ke la „reĝa ĉevalo” estas pli bone prizorgata ol la aliaj. Poste ni vizitis burĝon de la 15-a jarcento.

Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Laste ni vizitis vinproduktejon sen la promesita gustumado.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la historia urbo en meza Slovakio, Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento. Unue ni rigardis la mineralogian ekspozicion kun multegaj,



Vizito en la minejo

diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj. Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, manteloj kaj lanternoj ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo imagante la pezan laboron de tiamaj ministoj. La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de

kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo „Banskoštiavnický Betlehem”, kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.

Vesperaj kulturaj programoj konsistis el prezento de slovaka popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj „Civitano 4” kaj „Ni ne plu estu sklavoj”. Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo „No problem” el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj akrobataĵoj. Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon, kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.

La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

INTERNACIA FERVOJISTO

64-a eldonjaro

Dumonata fervojfaka Revuo en
Esperanto kaj organo de
Internacia Fervojista
Esperanto-Federacio

Prezidanto: Rodica Todor
(Rumanio)

rodica_todor@yahoo.com

Vicpr: Sylviane Lafargue
(Francio)

sylviane.lafargue@dbmail.com

Sekretario: Vito Tornillo
(Italio)

vitorni@virgilio.it

Kasisto: Laurent Vignaud
(Francio)

laurent.vignaud@free.fr

Redaktora Komisiono:
Gvidanto: István Gulyás
(Hungario)

istvan.gulyas@hdsnet.hu

Membroj: J. Ripoché
L. Niemann

Franca poŝtĉekkonto:
Ĉekoj aŭ giroj al
„Laurent Vignaud”
9 293 74 Y NANTES

IBAN:

FR3320041010110929374Y03237

BIC-kodo: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Apermonatoj:
januaro, marto, majo, julio,
septembro, novembro

Redaktofino:

Ĉiam la 10-an de la antaŭa
monato

ISSN 0230-323x

www.ifef.net

Faka Komisiono:

GV: Jan Niemann

niemann@kabelmail.dk

SK: D-ro Heinz Hoffmann

hoffmann-ifef@cablemail.de

SK: Ing Ladislav Kovář

kovar.lad@email.cz



La katedralo
„Sankta Dipatrino”
en Varna



La 68-a kongreso de IFEF
okazos de la 21-a ĝis
la 28-a de majo 2016
en la bulgara
urbo Varna